

O BRASIL ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.
NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO"

Número 41-42 (300-301)

Maio-Junho 1941

Redator responsavel:
Dr. Carlos Domingues

Administração e redação:
Praça da República, 54.
Rio-de-Janeiro. Brasil.

Gratuito para os sócios da Liga.
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15
respondukuponoj.

STATISTIKO KAJ ESPERANTO

Sekve de la rezolúcio aprobita de la Brazila Instituto de Geografio kaj statistiko, departemento senpere dependanta de la Prezidanto de la Respubliko, kiun prezidis Ambasadoro d-ro José Carlos de Macedo Soares, alpreni Esperanton kiel helpingvon, kaj de la eldono de Statistika Resumeto, nur en tiu lingvo, la Konsilantaro de Statistiko, enu el la du sekcioj de la Instituto, en ĝenerala kunveno, aprobis rezolucion, kies propono estis prezentita de d-ro Mario Teixeira de Freitas, ĝenerala sekretario de la Instituto. Tiu ni publikigis en unu el niaj antaŭaj numeroj, kaj malsupre reproduktas:

"REZOLUCIO N.º 128. — Paragrafo 1a. — La lernado de Esperanto estas deviga instrutemo de la teori-praktika kurso ĉiujare farita de la Instituto por la praktikantoj de la ŝtataj statistik-servoj.

Paragrafo 2a. — La ĝenerala Sekretariejo organizos la programon de tiu lernado, prizorgante, ke, orientita

D U B I L D O J

Du majstrajn bildojn vidis mi en sama Plej feliĉa okazo, ĉe pentristo:
Unu — paca, la dua — fajroflama;
Paco... Fajro... Kontrasto: jen l' artisto!

Kvazaŭ ĉe l' flanko de la sankta Kristo
Arduŝ infero kun malben' ĝiama,
Kiel se ĉe la floro de l' Ekzisto
Starus anĝel' detrua kaj malama.

Unu mentras arbaron, kie brulas
Serveme fajro dolĉa... Ĝi spegulas
La vivon mem, la pacon, la komforton...

Sur la dua, la fajro surtronigas...
Flamas trunkoj, verdaĵoj konsumigas...
Pentras la ruĝa dio ruĝan morton...

Porto Carreiro Neto.

de kompetentaj instruistoj, ĝi estos praktika kaj efika.

Obeante al tiu rezolucio la Sekretariejo de la Instituto ĵam organizi:

PANAMERICANISMO



Miss Doris Tappan

Lemos no número de 22 de Maio do "Jornal do Comércio" o seguinte:

"O escritório de Expansão Comercial do Brasil em Nova York informou ao Ministério do Trabalho que a Pan American Interlanguage Association, organização cuja finalidade é a de disseminar o esperanto como meio de estreitar as relações entre os países americanos, realizou uma sessão dedicada ao nosso país. O Sr. José Garrido Torres, daquele Escritório, compareceu à reunião, pronunciando uma conferência.

Durante a sessão foi exibido um filme sobre o Brasil. O local se achava ornado com jornais e revistas em esperanto publicadas no Brasil, que segundo o presidente daquela associação, Sr. George A. Connor, é o país do

la programon de la kurso, kiu estos inaŭgurata en la komenco de l' nunjara Julio. Ni antaŭjuĝas grandan sukceson al tiu kurso, kies valora helpo al la propagando de Esperanto estas grandega. Denove ni varmege dankas al d-ro Macedo Soares kaj al nia kara samligano d-ro Teixeira de Freitas pro ilia netaksebla kunlaboro por la venko de la genia kreitaĵo de Zamenhof.

La prez. B. L. E. sendis gratulan telegramon al d-ro Mario Teixeira de Freitas pro la granda honoro, kiun li ĵus ricevis. Per 18 voĉoj li estas elektita Prezidanto de la "Tutamerika Instituto de Statistiko", kies sidejo estas en Usono.

La veterana "Brazila Klubo Esperanto" ĵus aklamis d-ron Mario Teixeira de Freitas sia honora membro.

Hemisfério Ocidental em que o esperanto mais progrediu.

NOTA DA REDAÇÃO. O presidente da Liga Esperantista Brasileira recebeu do Sr. George A. Connor uma carta em que ele declara que deverá chegar ao Rio-de-Janeiro a 15 de Julho e aí permanecer até 27 de Agosto. Viajará em sua companhia a Senhorita Doris Tappan, diplomada pela Universidade de Colômbia, que representou o Governo dos Estados Unidos no Congresso Universal de Esperanto realizado em 1939, em Berne. A Senhorita Tappan propõe-se a fazer no Rio-de-Janeiro um curso prático de Esperanto pelo método Cseh, usado no "Internacia Sseh-Instituto de Esperanto", com sede em Haia, na Holanda.

Brazila Ligo Esperantista

Je la sepa de Junio nunjara okazis ĝenerala kunsido de *Brazila Ligo Esperantista* kun la ĉeesto de ties estraranoj, reprezentantoj de la filiaj grupoj: Brazila Klubo Esperanto, Esperanta Klubo de Baía kaj Grupo Esperantista "Ismael Gomes Braga" kaj de izolitaj membroj. Prezidis la kunsidon s-ro ing. A. Couto Fernandes kaj ĝin sekretarioj s-roj ing. Hernani Motta Mendes kaj João Teles da Silva kaj f-ino Iraní Baggi de Araujo. Post la legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunsido s-ro H. Motta Mendes sciigante la ĉeestantaron, ke li baldaŭ forlasos la brazilan ĉefurbon, petis ekigi de sia posteno de ĝenerala sekretario. La ĉeestantaro aprobis tiun peton kaj, laŭ propono de d-ro Carlos Domingues, akklamis lia anstataŭonto profesoron João B. de Mello e Souza, bonfarintau anon de B. L. E.

Poste estas akklamitaj ĝiaj honoraj membroj profesoro d-ro Luiz da C. Porto Carreiro Neto, kiu dum kelkaj jaroj kompetente plenumis la oficon de ĝenerala sekretario, kaj s-ro Francisco Valdomiro Lorenz, la unua eksterlanda esperantisto veninta al Brazilo.

Pri tiuj akklamadoj parolis la klera kaj sindona esperantisto s-ro Ismael Gomes Braga, kiu rememorigis la ĵus aperintan libron de S-ro F. Lorenz titolitan "Diverskolora Bukedeto", kiu enhavas liajn poeziojn tradukitajn el 40 lingvoj.

La prezidanto sciigis la ĉeestantaron pri la baldaŭa alveno al Rio-de-Janeiro de la konataj usonaj geesperantistoj s-ro George A. Conner kaj f-ino Doris Tappan, kiu sin proponas fari tie ĉi kurson de Esperanto laŭ la Csel'a metodo.

Laŭ propono de s-ro A. Caetano Coutinho, oni aprobis kondolencan deziroprimon pro la morto de s-ro Paulino Bandeira, la ĉeforganizinto de la 4a Brazila Kongreso de Esperanto.

Poste la prezidanto elmontris sian plezuron pro la ĉeesto de la klera kaj malnova esperantisto, d-ro Venancio da Silva, honora vicprezidanto de la Ligo. Post dankaj vortoj de d-ro Venancio da Silva la prezidanto fermis la kunsidon.

—○—

**BONVOLU PAGI VIAN
NUNJARAN KOTIZON**

ESPERANTO

Por iniciativa dos Estados Unidos, aceita em todas as Américas, a semana de 20 a 26 de abril de 1941 é dedicada a festas e serviços em favor do esperanto. Um pouco por toda parte as sociedades e os esperantistas individuais procuram esclarecer as grandes ligações que há entre o esperanto e o ideal cristão de paz e fraternidade. Além de ser instrumento neutro de compreensão internacional e neste aspecto empregado para as mais diferentes finalidades, o esperanto tem, para muitas pessoas, uma significação idealística, quasi mística, de símbolo de harmonia.

A experiência demonstra que os povos só confraternizam quando lealmente se entendem. Os que falam a mesma língua, raras vezes destroem-se.

E a paz, que se segue à guerra, consolida-se sem os eternos ressentimentos que sobrevivem entre raças de idiomas diferentes. Observados os fatos, resta indagar das causas, e estas não são difíceis de se descobrir.

O idioma tem uma significação imensa na formação da inteligência e do caráter. Cria o meio intelectual. Muito maior do que a influência de raça, é a influência de línguas. Os núcleos estrangeiros, fechados linguisticamente, permanecem sempre estrangeiros. Neste sentido há exemplos sombrios de minorias inassimiláveis que são causas de frequentes perturbações da paz, e o governo brasileiro está tomando medidas para evitar no Brasil esses quistos indesejáveis.

Assim, chega-se à compreensão de que o cultivo de uma língua neutra internacional, igualmente de todos, que a ninguém se impõe pela força de imperialismo e a ninguém humilha, é grande e sólida contribuição para a missão do Cristianismo, de confraternizar os homens e os povos. De fato os homens de boa vontade em todo o mundo cristão têm proclamado teoricamente que o esperanto exerce tarefa humanitária na preparação da paz. As pessoas que conhecem o idioma e o empregam na vida intelectual, além de convicção teórica, chega ao conhecimento prático dessa verdade. Estabelecem relações com a nata pensante de todos os países, conquistam preciosas amizades em todas as latitudes da terra e, de certo modo, vivem uma vida futura de compreensão em parte ignorada.

Em todos os países há homens inteligentes e bondosos, cuja amizade nos faz esquecer que há igualmente os maus e ignorantes. O esperanto revela essa primícia dos homens capazes e de boa vontade. Sem o esperanto não se conhecia o padre André Cseh, em Haia, o professor Delfi Dalmau, em Barcelona, Teo Jung, em Schveningen, Paulo Nylén em Estocolmo, José Scherer, em Los Angeles, Ernest Green Dodge, de Washington, o professor Okamoto, de Tóquio, o professor Won Keen, de Cantão, Edmond Privat, de Locarno, frei Vigbertus van Zon, de Vught.

* *

Pelo convívio com os bons de todos os países, resta o consolo da fé e da esperança no futuro da humanidade. O esperanto pôde dar o nobre veículo da ideal aproximação.

(Artigo editorial, publicado no "Correio da Manhã", de 22 de Abril.)

Amanto de Amazonaj Indianinoj

(El la tupia lingvo tradukis
Francisco Valdomiro Lorenz)

Rudá, Rudá, (1) -
loĝanto de l' ĉiel',
de l' pluvo vi amik',
mi nun petegas vin:
faru ke l' amat'
sentu amon nur al mi,
kaj ne al alia ajn virin',
kaj ĉi-nokte li vizitu min.

(El "Diverskolora Bukedeto")

(1) Rudá estas la tupia nomo de Amoro (dio de la amo).

BRAZILA KLUBO "ESPERANTO"

La sepan de Junio nunjara, ĉe la sidejo de la "Societo de Geografio", kunvenis en ĝenerala kunsido, sub la prezido de s-ro ing. H. Motta Mendes, la geanoj de *Brazila Klubo "Esperanto"* por elektado de nova estraro. Laŭ propono de s-ro ing. A. Couto Fernandes estas akklamita la jena estraro: Prez. — s-ro A. Caetano Coutinho, vicprez. — s-ro Arminio de Moraes, unua sek. — f-ino Iracema Alvares Coelho, dua sek. — f-ino Rosa Amaral Malheiro, unua kas. — s-ro Carlos B. da Costa Leite, dua kas. — f-ino Maria Amaral Malheiro. Estas ankaŭ akklamita la jena Konsilantaro: F-ino Iraní Baggi de Araujo kaj s-roj generalo José A. Silveira Sobrinho, d-ro Carlos Domingues, d-ro Fernando A. de Almeida Brandão, Ismael Gomes Braga, Antonio José Vaz, Nelson Dantas, Edmundo Vila Verde, Octaviano da Silva Lopes kaj d-ro Mario Ritter Nunes.

Laŭ propono de s-roj ing. A. Couto Fernandes, d-ro Carlos Domingues kaj Ismael Gomes Braga, estas akklamita honora membro de B. L. E. s-ro d-ro Mario Teixeira de Freitas, ĝenerala sekretario de la "Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko", pro la valoraj servoj de li faritaj al la propagando de Esperanto.

La prezidanto ekposedis la novan estraron kaj, dankinte la ĉeestantojn, kaj speciale d-ro Venancio da Silva, honoran vicprezidanton de B. L. E., fermis la kunsidon.

Esperanto-Semajno


BELO HORIZONTE — MINAS GERAIS

La Estraro de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko starigis la semajnon de la 20a ĝis la 26a de Aprilo kiel Esperanto-semajnon kaj proponis, ke en Brazilo oni faru la saman. En nia antaŭlasta numero ni diris, ke oni povus organizi almenaŭ unu aŭ du kunvenojn, per kiu oni festus tiun semajnon. Bedaŭrinde en Rio-de-Janeiro ne eble fari tion. Tamen dum ĝi okazis io tre valora. La gravaj ĵurnaloj "Jornal do Comércio" kaj "Correio da Manhã", kiuj havas multegon da legantoj, aperigis tre efikajn redakciajn artikolojn, kiujn ni reproduktas en tiu ĉi numero. Ankaŭ en la multelegata "Jornal do Brasil" aperis plia artikoleto de d-ro Domingos Barbosa, kies simpatio por Esperanto estas tre konata, kaj en aliaj ĵurnaloj oni legis notojn pri tiu semajno.

Ankaŭ en São Paulo aperis interesa komentario en "Correio Paulistano".

La loko, kie la Esperanto-semajno estas entuziasme festita, estis *Belo Horizonte*, ĉefurbo de ŝtato Minas Gerais. Laŭ propono de d-ro Aristoteles J. de Faria Alvim, la tiea esperantistaro brilege festis la nomitan semajnon. Oni okazigis tri kunidojn, el kiuj la unua kaj la lasta en la salono de la "Minas'a Terkultura-Societo". Malfermis la unuan d-ro Faria Alvim, kiu invitis s-ron Wilson Veado, tiean delegiton de niaj Ligoj, por ĝin prezidi. Paroladis ing. João Viana, malnova esperantisto, al kiu la propagando de Esperanto en ŝtato Minas Gerais multe ŝuldas, pri la "Historio de Esperanto" kaj s-ro Claudovino de Carvalho pri "Komparo inter la latinaj kaj esperanta lingvoj". S-ro Oscar Vieira deklamis poezion en Esperanto. Laŭ propono de s-ro Noraldino de Melo Castro, oni decidis sendi telegramojn al s-roj A. Couto Fernandes, prez. de B. L. E., kaj Ismael Gomes Braga.

La dua kunsido okazis en la sidejo de la *Departemento de Geografio kaj Statistiko*, kie d-ro Alvaro Alvim malfermis kurson de Esperanto. Poste paroladis pri la "Utilo de Esperanto" s-ro prof. Cicero Pereira. Interesan kronikon pri la personeco de s-ro José Felipe Azeredo Coutinho, la unua esperantisto en Belo Horizonte kaj la unua Prez. de "Montara Esperanto-Klubo", jam mortinta, faris s-ro Ary Theodolindo, redaktoro de la ĵurnalo "O Estado de Minas". D-ro Luiz Coutinho, filo de tiu pioniro, dankis la vortojn de s-ro Ary Theodolindo. Pri



Grupo de ĉeestantoj ĉe la inaŭguro de la ESPERANTO-SEMAJNO en Belo Horizonte, ĉefurbo de ŝtato Minas Gerais: 1) — D-ro A. Faria Alvim, 2) — S-ro Oscar Coelho dos Santos, 3) — S-ro Ozanam Gomes, 4) — D-ro Noraldino de Mello Castro, 5) — S-ro Misael Mendes, 6) — S-ro Oscar Dias Vieira, 7) — S-ro Cicero Pereira, 8) — S-ro Rubem Romanelli, 9) — S-ro Claudovino de Carvalho Junior, 10) — S-ro Wilson Veado, 11) — S-ro Luiz Anacleto Silos, 12) — Ing. João Viana, 13) — D-ro Luiz de Azeredo Coutinho.

la inaŭguro de l' kurso parolis s-ro Joaquim Ribeiro Costa, direktoro de la Departemento.

Ĉe la ferma kunsido paroladis s-ro Wilson Veado pri la "Esperantistaj organizaĵoj" kaj sciigis la ĉeestantaron pri la fondo de "Tutamerika Klubo por Universitata Interŝanĝo", kiu enhavas Departementon de Esperanto. Ankaŭ paroladis s-roj Luiz Anacleto de Silos pri la "Kaŭzoj, kiuj estigis la eblecon de la kreado de Esperanto", Noraldino Mello Castro pri "Esperanto kiel bazo de Prateco" kaj João Viana pri la "Motivoj inspirintaj Zamenhofon". Fermante la kunvenon s-ro W. Veado sugestis la restarigon de la multe laborinta "Montara Esperanto-Klubo", al kiu apartenis kelkaj ĉeestantoj, el kiuj li citis la nomojn de s-roj João Viana kaj Ary Theodolindo. Sekretariis la kunsidojn s-ro Misael Alves Mendes kasisto de "Grupo Esperantista Humberto de Campos".

Publikigis datalajn informojn pri tiuj kunsidoj la ĵurnaloj: "Diario da Tarde", "O Diário", "Folha da Manhã" kaj "Estado de Minas", kiu ankaŭ aperigis fotografajon kaj interesan kronikon de José Clemente titolitan — "Admirinda gento". Artikolo titolita "Realigintaj revoj" verkita de s-ro Luiz Anacleto Silos, aperis en la ilustrita revuo "Belo Horizonte".

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Por anstataŭgi s-ron Adinar Antunes Pinheiro, kiu memvole forlasis sian oficon de Ĉefdelegito de Internacia Esperanto-Ligo, tiu ĉi, interkonsente kun la prezidante de B. L. E. kaj la komitatano d-ro Carlos Domingues, elektis s-ron Antonio José Vaz, kies adreso estas: Rua Paraná, 71, Rio-de-Janeiro.

ENIGMA FAKO (SOLVO)

(Aperinta en nia 37-38a numero)

SILAB-ENIGMO N.º 1

1. Sebo. — 2. Inko. — 3. Lado. — 4. Erpi. — 5. Napo. — 6. Tifo. — 7. Oazo. — 8. Elfo. — 9. Sumo. — 10. Tipo. — 11. Ario. — 12. Sudo. — 13. Kulo. — 14. Okro. — 15. Naso. — 16. Skio. — 17. Eksa. — 18. Nulo. — 19. Tuno. — 20. Osto.

Silento estas konsento.

LOGOGRIFO N.º 1

Kiu tro multe deziras, nenion akiras.

Ricevis la unuan premion s-ro Hermes Pitta — Rua Augusto Guimarães, 117 — 1.º andar. Salvador. — Baía.

A Semana do Esperanto

Parece que o ano de 1941 marcará início de uma nova era para o esperanto nas Américas. A guerra privou os esperantistas do Novo Mundo de quasi toda a colaboração da Europa e com isso determinou uma série de iniciativas de grande alcance em nosso hemisfério.

Por iniciativa dos Estados Unidos, as sociedades esperantistas de todas as Américas consagram a semana de 20 a 26 de Abril a uma propaganda ativa do ideal de compreensão e paz simbolizado no esperanto. Por toda a parte fazem-se conferências, abrem-se cursos, distribue-se material didático, etc.

Dos países, onde nunca se haviam efetuado congressos, teem este ano reuniões gerais. Na Argentina efetuou-se de 11 a 13 do mês corrente o Primeiro Congresso Argentino de Esperanto, na cidade de Rosário, com o apoio da Associação Argentina de Esperanto, de Buenos Aires. No México realizou-se a primeira Assembléa Geral de Esperantistas no dia 15 de Março, na capital do País.

No Brasil faz-se um pouco por toda a parte em favor do movimento esperantista. Não é raro dizerem os esperantistas de outros países americanos com muita amabilidade que no Brasil trabalha-se modelarmente pelo esperanto, que o nosso país ocupa o primeiro lugar no movimento esperantista das Américas. Deduzida a parte gentileza nessas afirmativas, ainda fica alguma coisa de fundamental. Os pensadores brasileiros desde o princípio deste século teem-se manifestado entusiasticamente a favor do esperanto. Dentre uma grande lista de nomes que poderíamos preparar, basta mencionar Sylvio Romero, Afonso Celso, Humberto de Campos, Olavo Bilac, Medeiros e Albuquerque e Arthur de Azevedo que no início da propaganda, quando defender o esperanto era ato que reclamava especial coragem moral, bateram-se brilhantemente a favor daquilo que então se supunha ser uma utopia.

Os poderes públicos igualmente receberam com simpatia o movimento esperantista. O Brasil foi o primeiro país a decretar que o esperanto era linguagem clara para o telégrafo, em 1906, quando só alguns anos mais tarde todos os povos aceitaram o esperanto como linguagem clara nos telegramas. A partir desse ato oficial de 1906, longa é a série de serviços prestados pelo Governo brasileiro à causa do esperanto e ao seu reconhecimento oficial. A Liga Esperantista Brasileira foi reconhecida de utilidade pública e subvencionada pelo Governo Federal. Os Ministérios em diversas ocasiões teem feito emprego do idioma em serviços públicos de divulgação. O Sr. Presidente da Republica tem nomeado representantes do país em Congressos Universais de Esperanto. Numerosas publicações teem sido feitas pelos Departamentos Officiais: Correios e Telégrafos, Feira de Amostras, Departamento de Propaganda, Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística e outros.

Inegavel, pois que não é mera cortezia dos esperantistas americanos reconhecerem os progressos do esperanto em nosso país. Alem dos atos completos, um há que não chegou a alcançar a sua finalidade, mas mesmo assim teve grande signifi-

cação moral no mundo todo. Refirimo-nos ao parecer aprovado pelo Conselho Nacional da Educação, em 11 de Novembro de 1938, de que o esperanto deve ser obrigatoriamente ensinado nas escolas públicas do Brasil. Em torno desse parecer foi feita muita propaganda na imprensa esperantista do mundo todo durante os dois anos que decorreram desse parecer, até a decisão do Sr. Ministro da Educação. Os resultados morais foram excelentes. Finalmente o Sr. Ministro decidiu que o esperanto não pôde ser introduzido nos ginásios, porque os programas já estão muito sobrecarregados de matérias, isto é, não contestou as vantagens que haveria do ensino oficial e obrigatório do idioma, somente apresentou com muita razão a impossibilidade técnica imediata, ficando assim de pé os argumentos do Conselho Nacional de Educação em favor do esperanto.

Um dos motivos que nos assegura esse honroso conceito dos esperantistas de todas as Américas é o fato de ser impresso no Rio de Janeiro, semestralmente, sob a direção da nossa liga esperantista, um número especial de "O Brasil Esperantista", com o sub-título "Tutamerika Numero" (Número Panamericano).

De nossa literatura nacional já existem magistralmente traduzidos para o esperanto até poemas difíceis como "A Morte do Tapir" de Olavo Bilac, "Morte de Moema" de Santa Rita Durão, "Marília de Dirceu" de Thomaz Antonio Gonzaga, "O Rio e o Regato" de Francisco Vilela Barbosa, "A Canção do Exílio de Gonçalves Dias, "Meus Oito Annos" de Casimiro de Abreu, e muitos outros. Tais poemas incorporam-se aos primores da poesia universal nas bibliotecas esperantistas e vencem todas as limitações de tempo e espaço. Alguns deles teem sido musicados e tornaram-se canções tão apreciadas no Oriente como no Ocidente.

O esperanto é a chave que abre ao pensamento brasileiro as portas da compreensão no mundo inteiro, e nesse domínio quem mais dá é quem mais rico fica.

(Das **VARIAS**, do **Jornal do Comércio**, de 22 de Maio).

TUTAMERIKA NUMERO

Como brasileiro e como esperantófilo, é com o mais vivo prazer que averiguo quanto à propaganda do Esperanto, pelos esperantistas brasileiros, está, em paizes estrangeiros, sendo util ao Brasil.

Aliás, a brasilidade dos adeptos, entre nós, do idioma universal se tem de sobejo revelado no seu próprio desejo, pois querem o Esperanto como "língua segunda", isto é, como "língua auxiliar" da materna para melhor entendimento dos homens de todas as nações, e dos povos de todas as raças.

De como a propaganda em apreço serve, simultaneamente, ao Esperanto e ao Brasil, tenho uma prova irrecusavel, no ótimo **tutamerika numero** do brilhante órgão oficial da Liga Esperantista Brasileira, cujo redator responsavel é o Dr. Carlos Domingues, nome vantajosamente conhecido nos nossos círculos intelectuais.

O dito numero de **O Brasil Esperantis-**

TUTAMERIKA KLUBO POR UNIVERSITATA INTERŜANĜO

Fondigis en Belo Horizonte, ĉefurbo de ŝtato Minas Gerais, "Tutamerika Klubo por Universitata Interŝanĝo", studenta societo, kies celo estas stimuli la kulturajn kaj amikajn interrilatojn inter la studentoj de la superaj, normalaj kaj duagrada kursoj de la Norda, Centra kaj Suda Amerikoj. La oficialaj lingvoj de la Klubo estas la jenaj: portugala, hispana, angla, franca kaj Esperanto.

Estas kreitaj la Departementoj de la Normala kaj Ginnaziaj Kursoj, de Propagando, de Muziko kaj de Esperanto. Tiu ĉi celas: "a) — stimuli la uzon de Esperanto, kiel internacia helplingvo kaj kunfratigilo, ĉe la studentaro; b) — Utiligi Esperanton kaj la esperantistan idealon por realigi la tutamerikanismon inter la amerikaj studentoj.

La Departamento de Esperanto, kies direktoro estas s-ro Wilson Veado, delegito en Belo Horizonte de B. L. E. kaj I. E. L., funkcias apud la Direktantaro de la Klubo, kies sidejo estas en la Universitato de Belo Horizonte. Baldaŭ s-ro Wilson Veado malfermos kurson de Esperanto en tiu sidejo. Adreso por korespondaĵo: Rua Uberlândia, 290. Belo Horizonte. Minas Gerais.

ta, dado a lume para festejar o Dia da America, 14 de Abril, é não somente daquela benemérita associação, como das capitais dos Estados Unidos, da Argentina e do Canadá.

Fala, pois, em nome de quatro grandes nações americanas, e contem ainda uteis informes, relativos ao México, ao Uruguai, etc.

Do Brasil, de par com um farto punhado de notícias de caráter geral, e que particularmente muito nos interessam, traz, entre outras belíssimas versões para a língua de Zamenhof, uma, primorosa, da deliciosamente singela canção **Meus oito anos**, de Casemiro de Abreu.

Esta versão mais uma vez evidencia, de maneira incontrastavel, quanto o Esperanto é dutil, plástico, sonoro, e quanto, pois, vale também como língua literária.

Temos, assim, que o **tutamerika numero** de **O Brasil Esperantista**, editado para festejar o Dia da América, vai — continuando a sua inteligente e infatigavel propaganda, — dizer, como é mister, da vida e da cultura do nosso país, os milhões de pessoas que, espalhadas pelo mundo inteiro, conhecem o Esperanto.

Ninguém mais do que eu ama a língua que os colonizadores lusos nos herdaram com a fé e os costumes que temos, — e, do afeto que lhe voto, dou a única prova que, racionalmente, se lhe deve dar, no carinho com que procuro aprendê-la.

Se pudesse ser ela a língua universal,

**DIVERSKOLORA
BUKEDETO**

*poemoj kaj poemetoj el 40 lingvoj
tradukitaj de Francisco Valdomiro
Lorenz.*

*Eldono de Livraria da Federação.
Av. Passos, 30. Rio de Janeiro —
Prezo: bindita 7\$, broŝurita 5\$000.
1 vol. 160-paĝa.*

En tiu volumo oni trovas la plej interesan kolekton da poemoj ĝi: nun aperitan en Esperanto. Krom la tradukoj el 40 lingvoj, en aldono aperas originalaj poemoj de l' Aŭtoro.

Lorenz estas esperantisto de la unua horo. En 1890 li aperigis en Pardu-bice, Bohemujo, presitan de Fr. Hoblik, la unuan Esperantan lerno-libron por bohemoj, sub la titolo "Plena Lernolibro de Esperanto por Bohemoj". Li estis tiam 18-jara junulo kaj tuj poste enmigris en Brazilon, kie li fariĝis tre utila kaj estimata brazila civitano. Kiel brazila civitano li okupis diversajn oficialajn postenojn en servoj de enmigrado kaj instruado. Dum 9 jaroj li estis Direktoro de la Publika instruado en São Feliciano, kie li ĝis nun loĝas kiel emerita instruisto.

Kiel verkisto en la nacia lingvo de Brazilo li eldonis dekojn da rimarkindaj volumoj pri la plej diversaj temoj: lingvistiko, filozofio, popola medicino, etnologio, orientaj religioj, k. a. El tiuj verkoj, multaj jam elĉerpis diversajn eldonojn kaj fariĝis ĉiutaga legaĵo por multaj homoj. Do la nomo de nia Aŭtoro estas tre konata kaj estimata en la tuta Brazilo. Por memorigi la 50-jaran datrevenon de lia unua libro pri Esperanto, liaj amikoj en Santos, Ŝtato S. Paŭlo, donis lian nomon al nova Esperanta Societo kaj en la sama urbo li estas honora prezidanto de alia ne-esperanta Asocio.

Sur la kovrilo de la nova libro aperas 40 blankaj steloj ĵetantaj sian lumon sur la verdan stelon de Esperanto kaj ĉi tiu lasta verde heligas la ter-

IMITINDA EKZEMPLO DE HOMA FRATECO



De maldekstre dekstren: Ing. Alberto Couto Fernandes, generalo João Gomes Ribeiro Filho, gen. Francisco do Rego Monteiro, gen. Augusto Eduardo da Silva, s-ro Joaquim de Amaral Fontoura, gen. Manoel Correia do Lago, gen. Oscar de Azevedo Fernandes, gen. Valerio Barbosa Falcão, D-ro Eugenio A. Alves Mergulhão, gen. Joaquim Antonio Pereira, gen. Carlos Lindolfo Paes Barreto, s-ro Heraclito Moura Ribeiro kaj gen. Francisco Jorge Pinheiro. Partoprenis ankaŭ la tagmanĝon d-ro Luiz Arthur Lopes, kiu alvenis post la fotografado.

En la Jaro 1889a 138 knaboj, el kiuj estis s-ro A. Couto Fernando, prez. de "Brazila Ligo Esperantista", eniris en la Militan Lernejon de Rio-de-Janeiro, tiam lokitan ĉe la Praia Vermelha (Ruĝa Marbordo). Tamen nur ĉiuj sekvis la militan servon. Kelke da ili ĝin forlasis kaj fariĝis inĝeniero, advokato, industriisto, aŭ publika oficisto. Kiam, en la jaro 1939a, kompletigis 50 jaroj post ilia kadetiĝo, la restantoj kiuj tiam loĝis en Rio-de-Janeiro kunvenis en intima tagmanĝo por

festi tiun daton kaj decidis ĉiujare kune tagmanĝi je fiksita tago. Kiel agrable okazis la tri unuaj tagmanĝoj, dum kiuj la kunmanĝantoj rememoris la belajn tagojn de sia juneco, kiuj nun estas tiel malproksimaj!

Nun ekzistas nur 35 el tiuj knaboj kaj preskaŭ ĉiuj estas emeritoj, kies aĝoj varias inter 68 kaj 72 jaroj. Post 10 jaroj, kiom da ili restos! En la lasta tagmanĝo partoprenis 14, ĉar la ceteraj estas malsanaj aŭ loĝantaj ekster Rio-de-Janeiro.

globon. Unu el la 40 blankaj steloj estas iomete pli granda ol la aliaj, ĉar la portugala lingvo donis pli da poemoj al la volumo ol ĉiu el la 39 aliaj.

La poemoj estas tradukitaj el la jenaj lingvoj: portugala, hispana, franca, itala, kataluna, rumana, provenĉala, latina, antikva greka, novgreka, angla, germana, dana, holanda, sveda, rusa, pola, ĉeĥa, slovaka, kroata, bulgara, ukraina, blankrusa, latva, litova, sankrita, palia, cigana, armena, persa, hungara, estona, araba, japana, ĉina, baska, majaa, tupia, gvarania, keĉua; kaj kelkaj originalaj Esperantaĵoj. Do 41 lingvoj estis lerte uzataj de nia Aŭtoro, sed liaj enlandaj legantoj konas lian verkon "Iniciacão Linguística" kaj scias, ke li povus — se li dezirus — traduki ankaŭ el aliaj idiomoj.

Lorenz ĉiam partoprenis en la mondlingva movado. Laŭ "Enciklopedio de Esperanto" li estis aŭtoro de l' projekto "Mundial" kaj partoprenis en la studoj pri "Ido" k. a. En lia verko "Iniciacão Linguística" li kritikis ĉiujn plej gravajn projektojn. Do li estas unu el la esperantistoj, kiuj konas ĉiujn projektojn, ĉiujn ideojn pri lingvo internacia kaj pacience laboras por la venko de Esperanto. Pli klare ol vortoj, tiu fakto

diras al nesufiĉe instruitaj homoj, ke Esperanto estas la fina solvo de la problemo de lingvo internacia, malgraŭ ĉiuj atakoj de kontraŭuloj. Pri tiu alta valoro de la nova libro de Lorenz aludas la antaŭparolo de S-ro Ismael Gomes Braga en la sama verko.

La poemoj en la libro ŝajnas al ni elektitaj por plaĉi al ĉiuj gradoj de kulturo de la esperantistaro. De simplaj popolkantoj, kiujn facile komprenas junaj gelernantoj, ĝis la plej malfacilaj versoj de Dante Alighiere aŭ Olavo Bilac, kiujn nur kleruloj povos sufiĉe ŝati, la skalo estas tre longa. Ĉiu leganto — juna fraŭlino, knabo, aŭ eminenta filozofo — trovos en la libro ion taŭga por si, kiun li aŭ ŝi dezirus scii parkere. Jen kanto por infanoj en lernejoj, tradukita el la japana lingvo, kiu certe povas interesi al lernejestroj en la tuta mondo:

P E R S I S T O

*De saliko pendas branĉo,
ran' atingi volis ĝin;
saltis ĝi kaj falis,
levigante saltis;
kelkafoje refalinte,
ĝi resaltis, kaj je l' fin'
sur la branĉ' eksidis,
kaj nur tiam haltis.*

é bem de ver o júbilo que, por via disso, encheria o coração dos brasileiros e portugueses.

Estou, porem, que nenhuma nação poderosa concordaria em aceitar o idioma de outra como língua "segunda" ou "auxiliar."

E esse embargo do amor-próprio. — que se observa tanto nas nações quanto nos indivíduos, — vale por mais uma razão entre as muitas que militam em favor do Esperanto como língua universal.

— D. B.
(Do "Jornal do Brasil").

Vento blovas, kaj sur branĉo
teksas neston arane';
la teksaj' ŝirigis,
l' arane' ne plendis,
la ŝiriton retutigis
du-tri-foje, re kaj re,
je l' fin' la teksaĵon
sur la branĉo etendis.

Aliaj poemoj, pri amo, povas esti
komprenataj de ĉiuj junaj homoj, sed
aliajn, pri filozofiaj temoj, nur kle-
ruloj povas sufiĉe estimi.

Jen la lasta poemeto de la libro:

SUR LA BORDO DE MARO

Junulo, starante sur bordo de maro,
admiris la forton de tiu akvaro
kaj diris kun voĉo sonora kaj hela:
"Ho, kiel la mond' estas granda kaj
[bela!

Kaj kiel profunda kaj vasta la maro.
konstante movanta sin en la ondaro!
Ĝi estas la bildo de l' vivo kaj forto,
kaj estas mistera ĝi kiel la sorto!

Je l' mar' la ĉielon kompari ni povas,
en kiu milegoj da steloj sin movas;
kaj alta ĝi estas, pli alta ol ĉio,
la hejmo de l' Suno kaj luma radio!"

Aŭdinte la knabon, la patro respondis:
"Tre bone, ho filo, vi diris kaj sondis;
la mar' estas vere profunda, fortega;
la mond' estas bela kaj vasta, gran-
[dega

Sed io pli bela ol ĉiu beleco
ekzistas, kaj estas la Dia Saĝeco,
pli granda ol mondoj, ĉar Ĝi ilin kreas;
la mondoj ŝanĝiĝas, sed Ĝi ne pereas.

Ĝi estas de l' vivo la fonto mistera,
pli forta ol forto ĉiela aŭ tera.
Pli alte ol Suno, en lumo sen limo
destinis Ĝi lokon al homa animo".

Certe ĉiu nova aŭ malnova, juna aŭ
maljuna esperantisto trovos en tiu di-
verseco de pen'oj sian propran pen-
son, sian senton, tiujn versojn, kiujn
li aŭ ŝi mem dezirus esti skribinta kaj
sendinta en Esperanto al ĉiuj homoj
de nia planedo.

EL DANUJO

ONI POVAS SKRIBI ESPERAN-
TEN EKSTERLANDEN!

Ni atentigas niajn legantojn je tio.
ke oni povas skribi al ni en la lingvo
Esperanto el ĉiu lando, ĉar la germa-

LOUVOR DO VERBO NOVO

Uma língua de fogo,
língua do Espírito que é santo,
baixou à terra... e logo
eis que os homens irmãos se avistaram e se amaram
à essa luz — o Esperanto.

Um meteoro feliz fundiu todas as cores
num só arco-de-aliança;
e de todos os clamores
numa mesma harmonia...
E, numa alva aleluia em rosas de bonança,
eis que os homens irmãos entoaram um só canto
num só verbo — o Esperanto.

Uma estrela feliz entre os astros noturnos,
uma estrela maior — gloriosa e iluminada —
raiou dentre os pavores taciturnos...
raiou com a alvorada!
E hoje que já por todo o horizonte irradia
a grande estrela verde a subir tanto e tanto —
eis que os homens irmãos dão-se as mãos de alegria
à luz desse mesmo ceu que uma estrela alumia —
uma estrela — o Esperanto!

Oh novo Astro de Reis!
Sinal dos Tempos Novos!
Com teus fogos de amor desce do ceu profundo!
desce — para guiar, rumo à paz, reis e povos...
rumo da Salvação nas viagens do mundo!

MURILO ARAUJO

(Do "Brazila Esperantisto" — Setembro-Dezembro 1926.)

na milita cenzuro translasas la E pe-
ranto-lingvajn korespondaĵojn. Efe-
ktive ni ricevas ĉiutage Esperanto-ling-
vajn leterojn kaj poŝtkartojn el Uson-
no, Svedujo, Italujo, Hungarujo, Ju-
goslavo kaj aliaj landoj ..

El "Dansk Esperanto-Blad".)

MIAJ PROVERBOJ

Ĉiu bona familio
havos la benon de Dio.

Por venkadi ĉiun baron
oni uzu nur la faron.

Per volo, kredo kaj forto,
ni vivos eĉ post la morto.

Iu sendita poŝtkarto
provus resti viva parto.

Ne ĉiam labora horo
nin portas iom da oro.

Kiel homara kolero,
tiel estas la fiolero.

Kiam korpo estas malsata,
tiam ĉio estas malŝata.

Ne ĉiam feliĉa koro
kantus en preĝeja fiore.

Bonodora estas rozo,
sed plej pura estas roso.

Per litero post litero
estos preta la letero.

Inter edzo kaj edzino
restu disputa difino.

Kiun ne timigos perfido,
tiu venkos ĉion per fido.

Kiam pezas per pesilo
la komercisto tre ju ta,
tiam pezas la pezilo
NUR ĝia pezo tre ĝusta!

Josefo Scalenghe

Via Accademia Albertina 42, TORI-
NO. ITALUJO.

BRAZILA KRONIKO

AMAZONAS. Manaus. — Nia ticia delegito s-ro Sebastião Augusto Ark-censis varbi al nia movado d-ron André de Araujo juĝiston por neplenajuloj, kiu promesis lin helpi en la starigo de esperantista grupo, kiam li revenos el Rio-de-Janeiro, kien li veturis.

CEARÁ. Baturité. — La gazeto "A Verdade" publikigis poresperantan deziresprimon aprobitan de la *Dua Brazila Kongreso de la Katolikaj Ĵurnalistoj*.

RIO GRANDE DO NORTE. Natal. — Artikoloj de s-ro Arlindo Castor de Lima, aperis en la gazeto "Diário" kaj artikolo de s-ro Moacir S. Cunha en "A República".

Laŭ deziro de la estraro de la loka Asocio, la prez. de B. L. E. vizitis, en Rio-de-Janeiro, d-ron Gentil Ferreira, ĉefurbestron, kiu sin montris tre simpatia al Esperanto. Li promesis utiliĝi ĝin ĉe oficialaj publikigaĵoj kaj viziti la sidejon de nia Ligo.

En la kvartalo Alecrim fondiĝis virina esperantista organizaĵo, kiu ricevis la nomon — *LIDJA ZAMENHOF*.

PERNAMBUCO. Recife. — Aperis la Marta numero de "Pernambuco Esperantista", kiu enhavas literaturaĵojn, gramatikan lecionon kaj fotografajn de la estraro de "Esperanta Asocio de Rio Grande do Norte". Jen la adreso de s-ro Moacir S. Cunha: Avenida José Rufino. 3841.

Garanhuns. — Artikoloj pri Esperanto de Carmó en "Colégio 15 de Novembro", organo de la samnoma kolegio, kaj de s-ro Moacir Cunha en "O Diário".

BAÍA. Salvador. — S-ro d-ro Jaddo Couto Maciel klopodas, por ke la urba Gvidilo aperinta en portugala lingvo aperu ankaŭ en Esperanto. Pri tio interparoladis kun d-ro Neves da Rocha, ĉefurbestro, la prez. de B. L. E.

STATO RIO. Niterói. — Sub la aŭspicioj de la "Faculdade Fluminense de Comércio", kun sidejo sur la Strato José Bonifácio, n.º 30, malfermiĝis je la 24a de Majo kurso de Esperanto direktata de d-ro Mario Ritter Nunes, oficisto ĉe la "Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko". La salono estis tute plena. Prezidis la kunsidon d-ro Flodoaldo Cabral, direktoro de la Fakultato, kiu invitis por sidigi siaflanke, krom la parolantoj, s-ron Honorio Leal, unuatempan esperantiston, kaj s-ron João Teles da Silva, unuan sek. de B. L. E. D-ro Mario Nunes faris belan paroladon pri la facileco de Esperanto kaj ties progreso



Grupo de ĉeestantoj ĉe la inaŭguro de l' kurso de Esperanto en la "Instituto Fluminense de Comércio", en Niterói, ĉefurbo de Stato Rio. Sidantaj de maldekstre dekstren: S-roj João Teles da Silva, d-ro Flodoaldo de Carvalho, inĝ. A. Couto Fernandes, d-ro Mario Ritter Nunes kaj d-ro Isidro Pereira da Silva.

en la tuta mondo kaj ing. A. Couto Fernandes, prez. de B. L. E., malfermis la kurson farante resumon de la Esperanta gramatiko. En la nomo de la direktoro, d-ro Humberto Soeiro de Carvalho, fakultata profesoro, per belaj, dankaj kaj laŭdaj vortoj fermis la kunsidon.

Inter la ĉeestantoj vidiĝis la jenaj geesperantistoj: s-ino Honorio Leal, f-inoj Edith Wehrs kaj Balbina Moraes, s-roj d-ro Isidro Pereira da Silva, Aron Viktor Zoladz kaj José Griner. La direktoro de la Fakultato ricevis gratulan telegramon de s-ro Ismael Gomes Braga.

Ĉiuj gazetoj en Niterói sciigis sian legantaron pri la malfermo de la kurso. Dum la registara "Horo de Brazilo", ĉiutage disradiata de ĉiuj brazilaj radistacioj estas disradiita tiu sciigo.

STATO SÃO PAULO. São Paulo. — La stacio de "Rádio Piratininga" (PRH-3) daŭrigas sian ĉiutagan disradiadon de la esperanta horkvarono okazanta de la 8,45a ĝis la 9a horo, sub la direkto de "São Paulo Esperanta Klubo". De la komenco ĝis la 3a de Majo ĝi jam disradiis 325 programojn, kiuj daŭris 4875 minutojn.

La klubo akceptis la proponon de la prezidanto de la "Brazila Genealogia Instituto", por ke ĝi traduku esperanten la resumojn de la artikoloj de ĝia oficiala organo — La Genealogia Revuo. "Correio Paulistano" publikigis interesan komenton titolitan — *La Esperantista Semajno*. Jen estas la nova adreso de d-ro Geraldo de Azevedo, direktoro de la propagando: Rua Prof. Alfonso Bovero, 98. São Paulo.

Assís. — Sub la signo de Paco kaj Frateco fondiĝis la unuan de Majo la "Esperanta Instituto de Assís", kies direktoro estas d-ro Paulo Botelho de Camargo, advokato kaj membro de la Gazetara Asocio de São Paulo. Ĝia mallongigo EIA signifas en portugala lingvo: kuraĝe! La Instituto malfermis esperantan kurson, al kiu aliĝis 30 personoj, kies plimulto estas lernantoj de la Komunuma Gimnazio. S-ro Vitor Musumeci, direktoro de la Gimnazio, instigas siajn lernantojn partopreni la kurson.

La gazeto "Jornal de Assís" publikigas ĉiusemajne esperantan fakon sub la titolo "Oficiala Bulteno", verkitan de d-ro Paulo Camargo. La Instituto aliĝis al niaj Ligoj pere de la jenaj personoj: S-ino Mercedes Cintra de Oliveira kaj s-roj d-ro Paulo Botelho de Camargo, José Cintra de Oliveira, Antonio Ribeiro Monteiro de Barros, kaj Domingos Somma.

EIA! ankaŭ ni diras al la bravaj direktoro kaj lernantaro de la Instituto.

MINAS GERAIS. Belo Horizonte. — Aliloke ni detale parolas pri la brilaj kunvenoj okzintaj dum la Esperanto-semajno kaj la fondo de la "Tutamerika Klubo por Universitata Interŝango".

La Grupo Esperantista "Humberto de Campos", kun sidejo sur strato Curitiba, 636, aliĝis al niaj Ligoj pere de la jenaj grupanoj: S-roj Oscar Dias Vieira, Ozanam Gomes, Misael Alves Mendes, prof. Cícero Pereira kaj Orlando Pereira Cardoso. Koran dankon!

La Organiza kaj Aganta Komisiono de la *Tria Juneca Filatelio Ekspo-*

zicio sciigis nin, ke tiu ĉi okazos de la 22a ĝis la 29a de 1^a nunjara Junio. Kiel okazis en la du antaŭaj ekspozicioj, ĝi uzos specialan stampon kun teksto en Esperanto. Ni deziras al la *Tria* grandan sukceson.

São Sebastião do Paraíso. — “O Liberal” aperigis detalan raporton de s-ro Luiz Anacleto Silos, kiu estas nun en Belo Horizonte, pri la Esperanto-semajno kaj kelkajn liajn artikolojn.

Carangola. — Estas reelektita prezidanto de la tiea “Núcleo Esperantista” s-ro Armindo Cunha.

Juiz de Fora. — La Spiritista Centro “Venâncio Café” ĵus publikigis detalan raporton pri siaj aktivecoj, kiu enhavas ĉapitron pri Esperanto. Ĝi priparolas pri la kurso funkcianta en sia sidejo sur la strato Santo Antonio, 110, kaj pri la senpaga disdonado de 518 esperantaj lernolibroj.

RIO-DE-JANEIRO. — La sepan de Junio okazis ĝeneralaj kunvenoj de “Brazila Ligo Esperantista” kaj “Brazila Klubo Esperanto” pri kiuj ni parolas aliloke.

Vizitis la sidejon de B. L. E. d-ro Benjamin Camozato, unu el la pioniroj de Esperanto en Brazilo kaj prez. de “Sudbrazila Esperantistigilo”.

Ĉe la “Vegetariana”, kies posedanto estas s-ro Aleixo Alves de Souza, malnova esperantisto, kuntagmanĝis s-roj Manoel Miraglia, ĉefurbestro de Cuiabá kaj esperantisto, Ismael Gomes Braga kaj A. Couto Fernandes.

La 11an de Aprilo la “Grupo Esperantista *Bezerra de Menezes*” festis la unuan datrevenon de sia fondo per kunsido, dum kiu paroladis d-ro Moreira Guimarães, ĝia prezidanto kaj s-ro Ismael Braga. Kelkaj lernantoj de la kurso gvidata de s-ro Octacilio da Silva deklamis poeziojn kaj anekdotojn en Esperanto.

Dum la monatoj Aprilo kaj Majo la gazetaro en Rio-de-Janeiro multe helpis la propagandon de Esperanto. La gravaj taggazetoj “Jornal do Comércio” kaj “Correio da Manhã” aperigis efikajn redakciajn artikolojn pri la **ESPERANTO-SEMAJNO**. “Jornal do Brasil” aperigis tri bonajn poresperantajn artikolojn de d-ro Domingos Barbosa kaj noton pri tiu semajno. Simila kaj aliaj notoj aperis sur la ĵurnaloj “O Globo”, “O Imparcial”, “A Noite”, “Diário da Noite” kaj “Reformador”. Interesajn priesperantajn artikolojn publikigis “Reformador”, “Revista Espírita do Brasil”, “O Caminho” kaj “Juventude Unida”, orgão oficial da “Sociedade Internacional de Estudantes” (Internacia Studenta Societo).

ESPERANTISTA GAZETARO

Ni ricevis dum la monatoj Januaro, Februaro, Marto, Aprilo kaj Majo nunjaraj la jenajn eksterlandajn gazetojn kaj revuojn:

“Amerika Esperantisto”. Washington, Usono. Dec. 1940, Jan., Feb., Marto kaj Aprilo 1941.

“Arbetar Esperantisten”. Stockholm, Svedujo. Dec. 1940, Feb. 1941.

“Argentina Esperantisto”. Buenos Aires, Argentino. Okt.-Dec. 1940, Jan.-Feb. 1941.

“Belga Esperantisto”. Antwerpen, Belgujo. Jan.-Marto, 1940.

“The British Esperantist”. Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo. Okt.-Dec. 1940, Marto kaj Aprilo, 1941.

“Bulgara Esperantisto”. Sofia, Bulgarujo. Jun. 1940.

“Bütöno de I. E. L. Tegelbacken”. Svedujo. Okt. 1940 kaj Jan. 1941.

“Dansk Esperanto-Blad”. Aalborg, Danlando. Junio, 1940 ĝis Feb. 1941.

“Esperanto”. Genève, Svisujo.

“Esperanto Internacia”. Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo. Sep. 1940 ĝis Aprilo, 1941.

“Estu preta”. Illinois, Usono. Naŭa deka kaj dek-unua numeroj.

“Flandra Esperantisto”. Kortrijk, Belgujo. Majo, 1940.

“Fraterco”. Sevlievo, Bulgarujo. Okt. 1940 kaj Feb. 1941.

“Helena Esperantisto”. Athinai, Grekujo. Jul.-Aŭg. kaj Nov.-Dec. 1940 kaj Jan.-Marto, 1941.

“Heroldo de Cinio”. Chungking, Ĉinujo. Aprilo ĝis Aŭg. 1940.

“La Juna Vivo”. Limmen (N. H.), Nederlando. Dec. 1940, Jan. 1941.

“Nia Parolilo”. Goteborg, Svedujo. Okt. 1940 ĝis Marto, 1941.

“La Praktiko”. Den Haag, Nederlando. Jul. ĝis Dec. 1940.

“La Revuo Orienta”. Tokio, Japanujo. Dec. 1940 ĝis Marto, 1941.

“Sciencia Gazeto”. Rockford, Ill., Usono. Sep. ĝis Dec. 1940.

“Svisa Espero”. Zurick, Svisujo. N.º 1, 2 kaj 4, 1940.

“La Suda Stelo”. Slavonski Brod, Jugoslavujo. Jul.-Aŭg. kaj Nov.-Dec. 1940, Jan. 1941.

“Svenska Esperanto-Tidningen. La Espero”. Stockholm, Svisujo. Dec. 1940, Jan.-Feb. 1941.

KION CELAS I.E.L.?

I.E.L. celas disvastigi la uzadon de Esperanto kaj tiel plifaciligi la moralajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj. Ĝi ankaŭ celas servi siajn membrojn laŭ diversaj manieroj kaj kreskigi inter ili estimon por fremdaj popoloj.

KION FARAS I.E.L.?

I. E. L. ebligas al siaj membroj la praktikan uzadon de la lingvo.

Ĝi konstruadas fortan centron de Esperantista agado.

Ĝi prizorgas kaj helpas la kunagadon de naciaj kaj fakaj Esperantistaj organizaĵoj, kaj mem kunlaboras kun tiuj organizaĵoj por propagandi la lingvon en ĉiuj rondo.

Ĝi organizas la universalajn Espe-

Grupoj Aligintaj al B. L. E.

BRAZILA KLUBO “ESPERANTO”. (1906). Sidejo: *Praça da República*, 54. *Rio-de-Janeiro*.

SUDBRAZILA ESPERANTISTIGILO. (1927). Sidejo: *Rua dos Andradas*, 1431. *Porto Alegre, Rio Grande do Sul*.

CENTRO ESPERANTISTA DE SANTOS. (1932). Sidejo: *Rua Baía*, 57. *Santos, Est. São Paulo*.

ESPERANTA GRUPO DE BAÍA. (1936). Sidejo: *Rua Bangala*, 18. *Salvador, Baía*.

S. PAŬLO ESPERANTA KLUBO. (1937). Sidejo: *Rua Alabastro*, 447. *São Paulo*.

PERNAMBUKA ESPERANTO-ASOCI. (1937). Sidejo: *Rua do Principe*, 398. *Recife, Pernambuco*.

ESPERANTO - KLUBO DE SANTO AMARO. (1937). Sidejo: *Av. Viana Bandeira*, 14. *Santo Amaro, Baía*.

GRUPO ESPERANTISTA “ISMAEL GOMES BRAGA”. (1938). Sidejo: *Praça D. Moura*, 334. *Garanhuns, Pernambuco*.

GRUPO ESPERANTISTA DE ARAGUARI. (1939). Adreso: Caixa postal 73. *Araguari, Minas Gerais*.

KATOLIKA ESPERANTISTINA KLUBO. (1939). Sidejo: *Rua Benfica*, 2457. *Fortaleza, Ceará*.

ESPERANTO-KLUBO DE ALAGOINHAS. (1940). Sidejo: *Rua 24 de Outubro*, 12. *Alagoinhas, Baía*.

“CARLO BOURLET” ESPERANTO-GRUPO. (1940). Adreso: *Caixa postal*, 94. *S. Sebastião do Paraíso, Minas Gerais*.

ESPERANTA ASOCIO DE RIO-GRANDE-DO-NORTE. (1940). Sidejo: *Rua Vigário Bartolomeu*, n.º 587. *Natal, Rio-Grande-do-Norte*. — Adreso por korespondajo: *Av. Tavares de Lira*, 105.

GRUPO ESPERANTISTA DE LIMOEIRO. (1940). Adreso: *Caixa postal*, 73. *Limoeiro, Ceará*.

ESPERANTA INSTITUTO DE ASSÍS. (1941). Adreso: *Rua Smith Vasconcelos*, 9. *Assís, E. de São Paulo*.

GRUPO ESPERANTISTA “HUMBERTO DE CAMPOS”. (1940). Sidejo: *Rua Curitiba*, 636. *Belo Horizonte, Minas Gerais*.

BONVOLU ELEKTI REPREZENTANTON ĈE LA KUNSIDOJ DE “BRAZILA LIGO ESPERANTISTA”.

ranto-kongresojn kaj eventuale aliajn kongresojn kaj konferencojn.